

# *Gazeto*



# *Andaluzia*

*Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro*

35-a Jarkolekto - Decembro 2021 - N-ro 123



**Oktobero / Decembro 2021**  
**Enhavo**

- P. 03 Esperanto en Andaluzio.**
- P. 06 Hiroŝimo, Nagasako kaj ...ĉu Kordobo?**
- P. 11 ¿La Paz necesita una lengua?**
- P. 14 Lingva Angulo.**
- P. 18 Poezia Angulo.**
- P. 19 Nuntempa Vortaro**
- P. 21 Folioj por Praktikado**
- P. 26 Turismi en ...  
*Cómpeta (Malago)***
- P. 30 Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio:  
*Francisco Godoy Calvo. Socialisto, sindikatisto kaj esperantisto en Almerio.***
- P. 33  $E=mc^2$  Scienca Angulo:  
*Mesaĝo en la stelojn.***
- P. 35 Flamenko  
*El Garrotín.***
- P. 37 Fervojista angulo  
*La Fervoja Andaluzia Kompanio 1877 - 1936***
- P. 39 Nun Ni. Infanoj.**
- P. 41 Komikso.**
- P. 48 Andaluzia kuirarto  
*Malaga salato.***
- P. 50 Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio: *La Indalo***
- P. 52 Vorto-ludoj  
*Krucvorto kaj Rebuso.***
- P. 54 Humuro.**

## ***Gazeto Andaluzia***

*Fundada por D. José Garzón Ruiz, en San Fernando (Cádiz) en 1910. Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.*

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto  
REDACCIÓN: C/ Ánfora 6 5-D  
29013 Málaga (Hispanio)  
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86.  
ISSN: 1576-0618.

DIRECTOR: Ángel Arquillos López  
REDACTORES:  
José María Rodríguez Hernández  
Alejandro Burgos Escalante  
COLABORADORES:  
Vicente Herrera Cobo  
Juan García del Río  
Lukas Toczki

*Sur la kovrilo:  
Panorama vidaĝo de Cómpera (Malago)*

# ESPERANTO EN ANDALUZIO

## ANDALUZIA STUDANTO SUKCESIS EN POZNANO (Pollando).-

La pasintan monaton februaron, Vicente Manzano Arrondo sukcese finis postgradajn interlingvistikajn studojn en la Universitato Adam Mickiewicz, en la pola urbo Poznano. Vicente estas lernanto stipendiita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo por sekvi tiujn studojn dum la periodo 2017-2020. Post tri jaroj da studado estis necese prezenti eseon pri lingvistika temo, tiu redaktita de Vicente Manzano temis pri *"Ĉu komunikado bezonas internacian lingvon aŭ interkulturan?"* Pere de ĉi tiu eseo Vicente Manzano esploras la nuntempan rolon de la angla en komunikado, montras kiel ĝi limigas la larĝan interkulturecon en scienco kaj gvidas al lingva supremado, krome surbaze de intervjuoj kun diverslandanoj li serĉas pli interkulturan solvon.

Vicente Manzano Arrondo estas doktoro pri Psikologio, pri Edukado kaj pri Ekonomio. Li estas profesoro en la Fakultato pri Psikologio en la Universitato de Sevilo.



Vicente Manzano Arrondo montras sian ĵus akiritan diplomon pri Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz de Poznano (Pollando)

## UNIVERSITATO DE GRANADO ELDONAS LIBRON PRI ESPERANTO.-

Eldonita de la Universitato de Granado ĵus aperis la libro *"Lengua y Utopía. El movimiento esperantista en España, 1890-1936"* (Lingvo kaj Utopio. La esperantista movado en Hispanio, 1890-1936). Temas pri ampleksa studo pri nia movado en Hispanio dum tiuj jaroj. La aŭtoro estas Roberto Garvía, profesoro pri Sociaj Sciencoj en la Universitato Carlos III de Madrido. Li ankaŭ estis vizitanta profesoro en la Universitato de Harvard en Usono kaj en la Instituto Max-Plank de Germanio. Ĉi tiu verko ne estas la unua sur kiu li parolas pri nia lingvo, tiel, en la jaro 2016, li publikigis en la angla lingvo *"Esperanto and Its Rivals. The struggles for an international language"* (Esperanto kaj ĝiaj rivaloj. La lukto por internacia lingvo).



## ESPERANTO EN MEZGRADA LERNEJO DE LA KVARTALO TORREBLANCA, EN SEVILO.-

Dank'al la iniciato de nia samidano David Romero oni organizis en la Mezgrada Lernejo de la kvartalo Torreblanca en Seviljo, malgrandan kurson pri Esperanto. David estas profesoro en tiu gimnazio, li altiris la atenton de grupeto de gelnantoj kaj eĉ la apogon de aliaj profesoroj de la lernejo. La kurseto okazas ĉiuĵaŭde kaj laŭ sciigo de David, la gelnantoj jam kapablas paroli inter si en bazaj esperanto-frazoj, nur post kvar ĵaŭdoj.



## SEVILA RADIOSTACIO PAROLIS PRI ESPERANTO.-

La pasintan 1-an de marto Radio *Gelves*, radiostacio en la provinco Sevilo, intervjuis nian samideanon Vicente Manzano Arrondo, profesoro en la Universitato de Sevilo kaj membro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. La intervjuo enkadriĝis en la programo "*Otro mundo es posible*" (Alia mondo eblas), reĝisorita de la ĵurnalisto María José Rodríguez, direktorino de Radio Gelves.



### ***LASTMOMENTA INFORMO***

La 81-a Hispana Kongreso de Esperanto okazos en Sevilo de la 12-a ĝis la 15-a de oktobro 2023, tion oni decidis kadre de la ĵus okazinta kongreso de Esperanto en la urbo *Comillas* (Kantabrio). Sur la venonta numero ni informos pli detale pri la venontajara kongreso. Do, rezervu jam tiujn datojn por ĉesti hispanan kongreson okazanta en andaluzia urbo: Sevilo.





# *Hiroŝimo, Nagasako kaj ...*

## *ĉu Kordobo?*

Nuntempe, kiam terura milito okazas en Eŭropo, ĉiuj ĵurnaloj parolas pri la atom-bomba minaco ekzistanta kiam nuklea potenco eniras en militon. La mondo jam konis tiun kruelaĵon, tiam en la jaro 1945 Usono ĵetis du atomajn bombojn super Japanion, en la urboj Hiroŝimo kaj Nagasako. Tamen, ĉu vi scias, ke la urbo Kordobo<sup>1</sup> povis esti la tria urbo en tiu terura listo de urboj detruitaj fare de nukleaj armiloj? Jes ja! Ni konu la historion.

Unue, estas necese diri, ke ne temas pri la andaluzia urbo Kordovo, kiu esperantigita uzas la literon "V", sed pri la samnoma urbo Kordobo en Argentino.

Trakuris la jaro 1982-a, tiam la militista junto, kiu diktatorece regis Argentinon, premita de ekonomia kaj socia krizo, decidis savi sian dignon per la milita okupacio de la Malvina insularo, Falklandaj insulo laŭ la brita nomo. Ĉi tiu insularo, okupita de Britio en la jaro 1833 post la sendependiĝo de la Respubliko Argentino, troviĝas en la listo de ne-aŭtonomaj teritorioj de Unuiĝintaj Nacioj. Multfoje, la Ĝenerala Asembleo de UN postulis al argentina kaj al la brita registaroj ekigi konversaciojn kun la fina celo malkoloniigi la teritorion kaj certigi la teritorian integrecon de Argenino. Tamen, Britio, kiel kolonia potenco, rifuzas ade tiujn postulojn kun la preteksto, ke oni devas respekti la dezirojn de la enloĝantaro.

Tiel, la 2-an de aprilo 1982-a, la militista junto de Argentino decidis okupi la insularon post la nuligo de la defendajn rimedojn de kolonio, kiu verdire nur temis pri kelkaj dekoj da soldatoj. La brita registaro tuj reagis. El

<sup>1</sup> *Kaj en Hispanio kaj en Argentino ekzistas urboj kun la nomo "Córdoba". La esperantistaro de la hispana urbo decidis esperantigi la nomon per "Kordovo", tiuj de Argentino uzas "Kordobon".*



La Malvina Insularo (Falklandaj insuloj laŭ Britio) estis kaŭzo de du-monata milito inter Argentino kaj Britio en la jaro 1982-a.

britaj havenoj eliris milit-ŝiparo kun du grandaj aviadil-ŝipoj kaj dudeko da aliaj ŝipoj. Sur ili troviĝis pli ol dek mil soldatoj kaj dekoj da aviadiloj.

La brita registaro taksis, ke la argentina armeo ne kombatus kaj do, la sud-amerika registaro ordonos la tujan revenon de la argentinaj soldatoj en la kontinenton, eĉ plie, kiam brita submarŝipo sinkigis argentinan krozo-ŝipon. Tamen, la argentina armeo, ĉefe la aera forto, respondis kaj ili atakis pere de misiloj kelkajn britajn ŝipojn, kiuj fine restis detruitaj. Ĉi tiuj armiloj estis la francaj kontraŭ-ŝipaj misiloj *Exocet*. Francio estis milita kaj ekonomia aliancano de Britio. En tiuj jaroj ambaŭ ŝtatoj estis membroj de la milita organizaĵo NATO kaj de Eŭropa Ekonomia Unio. Do, Britio postulis al Francio ricevi la necesajn datumojn por nuligi la efikon de tiuj francaj mempropulsaj pafaĵoj.



La francaj misiloj *Exocet* estis uzataj de argentinaj milit-aviadiloj por detru britajn ŝipojn dum la milito.

La brita registaro ankaŭ timis la eblajn rusajn submarŝipojn navigantaj proksime al la insularo, kiuj povus havigi al la argentina ĉefstabo informojn pri la ĝusta situo de la britaj milit-ŝipoj. Se tio okazis kaj la francaj misiloj daŭre kapablis sinkigi britajn ŝipojn la brita ĉefministro Margaret Thatcher pripensis

eblon uzi atom-bombon kontraŭ argentinan gravan urbon, ne necese la Bonaera ĉefurbo. Tion asertis en la jaro 2005 konsilanto de la franca prezidento François Mitterrand, kiu sciis pri tiu minaco se fine Francio ne havigis al britoj la necesajn informojn por nuligi la detruan kapablon de la efikaj kontraŭ-ŝipaj misiloj.

Verdire, ne ĉiuj historiistoj akceptas la ekziston de plano por atom-bombardi urbon en la argentina kontinenta teritorio. Tamen, estas tute certa la fakto, ke ene de kelkaj britaj milit-ŝipoj senditaj por rekuperi la insularon troviĝis atomaj armiloj. Konkrete temis pri kelkaj atom-bomboj de la klaso WE-177-A, konstruitaj specife por detruai submarŝipojn, tamen ankaŭ kapablaj por esti ĵetitaj super urbon. Laŭ britoj poste informis, ĉi tiuj armiloj troviĝis en kelkaj kontraŭ-submarŝipaj fregatoj kiuj akompanis, kiel eskortaj ŝipoj, al aviadil-ŝipoj. La brita mar-armeo poste deklaris, ke pro la urĝa sendo de la ŝiparo en la Sud-Atlantikan Oceanon, ili ne disponis pri sufiĉe da tempo por demeti tiujn armilojn el la fregatoj. Tamen, oni devas akcepti la ideon, ke tiuj armiloj estus tre utilaj al britaj ŝipoj se, kiel poste oni sciis, rusaj submarŝipoj troviĝis proksime al la insularo por helpi, se necese, la argentinojn.



Soveta submarŝipo kontrolis la deplejonojn de britaj ŝipoj proksime al Malvina insularo. Laŭdire, el tie oni havigis al argentinaj necesajn informojn por ataki britajn ŝipojn.

Tamen, kiel dirite, la plej grava minaco por la britaj milit-ŝipoj estis la argentinaj aviadiloj. La sinkigo de almenaŭ 6 ŝipoj kaj la detruo de pli ol 30 britaj aviadiloj fare de la argentinaj pilotoj igis tute necesa la nuligon de la argentina aera forto, se britoj deziris atingi sukceson en la repreno de la insularo. Tiel, se pliaj damaĝoj al brita ŝiparo okazus, ĉefe se unu el la grandaj aviadil-ŝipoj estus detruitaj, oni pripensis planon por averti al argentina registaro pri la neceso haltigi la lukton kaj samtempe provoki kiel eble plej grandajn damaĝojn al la argentina aera forto.



Tiu plano baziĝis sur la uzo de atom-bombo kontraŭ la ĉefajn industriojn en Argentino kiuj produktis aŭ riparis milit-aviadilojn. Tiuj industrioj lokiĝis proksime al la urbo Kordobo.



La argentina urbo Kordobo kun ĝiaj 1.600.000 enloĝantoj estas la dua plej granda urbo en la Respubliko Argentino. En ĝi troviĝas gravaj industrioj pri aŭtomobiloj kaj aviadiloj.

Se tiu atom-bombo estus ĵetita kontraŭ la urbon kaj ĉirkaŭaĵojn, ties rezultoj ne estus similaj al tiuj uzitaj kontraŭ Japanio en la jaro 1945-a. La atom-bombo WE-177-A, pri kiu disponis britoj en siaj ŝipoj ĉirkaŭ la Malvina insularo, havis duonan potencon se oni komparas ĝin kun tiuj ĵetitaj de la usonanoj fine de la dua mondmilito. Kaj kial la celita urbo estis Kordobo? Nu, kiel dirite temas pri granda, sed ne la plej granda, urbo en Argentino kaj proksime al ĝi troviĝas la ĉefaj industrioj por konstrui kaj ripari aviadilojn. Do, temis pri strategia celo por samtempe detruji la spirit-fortojn de la argentinoj kaj samtempe nuligi gravajn militajn resursojn, kiuj kaŭzis la detruon de sufiĉe nombraj militaj rimedoj de Britio en tiu milito.

Feliĉe, ĉi tiu terura plano de la brita premiero, diskonigita de konsilanto de la franca prezidento, fine ne okazis. Tamen la milito daŭris kaj dum ĝi okazis la morto de preskaŭ mil homoj.

*J.M.R.H.*

## **ALIĜU AL Andaluzia Esperanto-Unuiĝo**

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: [cordoba@esperanto.ac](mailto:cordoba@esperanto.ac)  
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:

- Caixabank ES74 2100 7234 6713 0048 0698

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:  
- Nomo de la aliĝanto.  
- Afero: Kotizo 2022.



## **HAZTE SOCIO DE LA Asociación Andaluza de Esperanto**

Si deseas colaborar en la difusión de la lengua internacional en Andalucía, aquí tienes tu asociación.

.Para hacerse socio contacta con: [cordoba@esperanto.ac](mailto:cordoba@esperanto.ac)  
Cuota anual: 20 € que se pueden abonar en la cuenta siguiente:

- Caixabank ES74 2100 7234 6713 0048 0698

Cuando pagues por favor informa de los siguientes datos:  
- Nombre del socio.  
- Concepto: Cuota 2022

## ¿ La Paz necesita una lengua?

Cuando en el año 1885 el sacerdote alemán J.M. Schleyer inventó la lengua volapük mucha gente alabó su proyecto, por el indudable avance que la adopción de una lengua internacional supondría para el comercio internacional. No en vano, el símbolo de la nueva lengua era el *caduceo*, que aparecía siempre junto a Mercurio, dios romano del comercio. Cuando unos años después, en 1887, el médico polaco L. Zamenhof dio a conocer su creación, el esperanto, se empezó a considerar que el mundo sería un lugar más pacífico si todos dispusiéramos de una lengua común para entendernos. Así, aunque ambos proyectos tenían el mismo objetivo, dotar de una lengua vehicular a la humanidad, el volapük fue recibido como el idioma de los comerciantes, mientras que el esperanto lo fue como la lengua de la paz.



En el símbolo de la lengua Volapük aparece el caduceo, atributo del dios romano Mercurio. En la simbología del esperanto la idea de la paz ocupa un lugar preeminente.



No en vano, y aunque bien pudiera tratarse de una bonita leyenda, siempre se ha dicho que el joven Zamenhof creó su lengua apesadumbrado por las divisiones que existían entre las comunidades que habitaban en su ciudad natal Bialystok, donde convivían, a veces no muy pacíficamente, polacos, rusos, judíos, alemanes y bielorrusos. Si se quería vivir en paz, se necesitaba de una lengua común. A partir de ese momento la denominación del esperanto como *lingvo de la paco* ha sido una constante en la propaganda, a veces un poco ingenua pero siempre bien intencionada, de nuestra lengua.

¿Pero de verdad necesitamos de una lengua común para que el mundo pueda vivir en paz? Veamos la cruel realidad que hoy mismo vivimos en la vieja Europa. Hace unos meses Rusia agredió a Ucrania, dio comienzo a una guerra brutal que tiene lugar entre países que durante mucho tiempo han convivido incluso dentro de una misma federación.

¿Por qué ha ocurrido esta guerra? ¿Acaso rusos y ucranianos no se entendían? En efecto hablan lenguas distintas, pero las dos provienen de la misma familia y más de la mitad de las palabras de un idioma son semejantes a las del otro. Por otra parte, el presidente de la República de Ucrania tiene como lengua nativa el ruso, la misma que el país que le agrede. Lo que demuestra que el hecho de hablar la misma lengua, o diferente, para nada afecta a que el mundo viva con más o menos paz.



Volodimir Zelenskij, presidente de Ucrania, y Vladimir Putin, presidente de la Federación Rusa.

Es cierto que, históricamente, el hecho de hablar una lengua diferente ya denotaba que quien no era entendido era el contrario, el enemigo o simplemente distinto, con la evidente discriminación que eso podía suponer. Eso lo hemos visto en la multitud de películas que se han venido produciendo sobre la segunda guerra mundial. La mayoría de ellas se rodaron en inglés, respetando en el guión que los soldados de los ejércitos contrarios aparecieran en la película hablando en su propio idioma. Sin embargo, cuando las películas eran dobladas a otros países, entre ellos al nuestro, eran doblados solo los diálogos de los protagonistas anglo-parlantes, dejando que alemanes y japoneses siguieran apareciendo con su lengua. Un día le pregunté a un especialista en doblajes por qué eso era así. Su respuesta fue muy simple: si doblamos al español o a cualquier otro idioma lo que ellos dicen podríamos entenderlos y entonces ya no serían *los malos* de la película.

Sin embargo, todo esto ha cambiado. Hoy somos conscientes de que el mundo es una aldea global, en la que todos nos vemos como vecinos de al lado con los que podemos hablar en tiempo real.

En la actualidad hablar una lengua que no entendemos no nos hace dudar de las intenciones del otro. Por eso puede afirmarse, que el hecho de que todos hablemos la misma lengua o dispongamos de un idioma auxiliar para entendernos, para nada va a hacer que nuestro mundo sea más pacífico. La guerra, como dice el preámbulo de la Constitución de la UNESCO, *nace en la mente de los hombres, por lo tanto es allí donde debe introducirse la idea de la paz*, "sea en la lengua que sea," podríamos añadir nosotros.


Todas las lenguas, y no solo el esperanto, pueden ayudarnos a comprender al otro, pero si no valoramos la paz a nivel individual y a nivel político en las sociedades donde vivimos, no podremos enraizarla en nuestra vida. Como dijo Gandhi, *no hay camino para la paz, porque la paz es el camino*. Lo que aplicado a las lenguas viene a significar, que no hay lengua para la paz, porque la paz es el dialogo con el otro sea en la lengua que sea y muchas veces incluso sin necesidad de palabras.



**NE AL LA MILITO! PACON EN UKRAINIO!**

# Lingva Angulo

## Antaŭ - Antaŭ ol



*Antaŭ* es un adverbio que indica prioridad en el tiempo o en el espacio, se traduce al español como "antes de" (si hablamos de tiempo) o "delante de" (si nos referimos a un lugar). Hay que observar que en la traducción al español ya incluimos la preposición "de", que a menudo acompaña al adverbio "antes" en español. Así, si en español decimos "eso ocurrió antes de tu nacimiento", en esperanto no es necesario añadir la preposición "de" a *antaŭ*, sino que simplemente lo traducimos como *tio okazis antaŭ via naskiĝo*.

Lo mismo ocurre si hablamos de prioridad en el espacio. *Mia domo estas antaŭ la parko*, lo traduciremos como "mi casa está delante del parque". Es decir, *antaŭ* expresa la idea en español de "antes de" o "delante de".

Sin embargo "antes de" también se usa como introducción en algunas oraciones subordinadas en las que la mención del tiempo es importante. Vamos a aclarar esta idea que no es tan complicada como parece.

Existen oraciones en las que una de ellas se refiere a un momento en el tiempo, que resulta esencial para comprender la otra oración y en las que aparece la locución "antes de". Ejemplo:

- Visitaré a mi padre antes de ir a trabajar.
- Llame a la puerta antes de entrar.

En estos casos el adverbio "antes" siempre da idea de prioridad en el tiempo, no en el espacio, ya que hablamos de momentos y no de lugares.



En estos casos, es decir cuando "antes de" va delante de un verbo en infinitivo o de una oración, usaremos *antaŭ ol*. Le añadiremos pues, la conjunción *ol* que en esperanto aparece siempre que hablamos de una comparación. En este caso *ol* muestra una comparación entre acciones que suceden en dos momentos diferentes, siendo uno de ellos anterior al otro.

## Si antaŭ va delante de un verbo o introduce una oracion le añadiremos ol

Veamos algunos ejemplos:

- *Frapu la pordon antaŭ ol eniri.*  
Llama a la puerta antes de entrar.
- *Policisto pafis antaŭ ol aresti la ŝteliston.*  
Un policía disparó antes de arrestar al ladrón.
- *Li kriis la respondon antaŭ ol mi legis la demandon.*  
Él gritó la respuesta antes de que yo leyera la pregunta.
- *Mia amiko aĉetos botelon da bona vino antaŭ ol ni iros nokto-manĝi.*  
Mi amigo comprará una botella de buen vino antes de que vayamos a cenar.

Vemos que en estos dos últimos ejemplos *antaŭ ol* introduce otra oración: *mi legis la demandon / ni iros nokto-manĝi*. Se trata de una oración subordinada que expresa la idea del momento en que ocurrió o ocurrirá la oración principal: *li kriis la respondon / mia amiko aĉetos botelon da vino*. Como la oración subordinada da una idea de algo que sucede en el tiempo usaremos *antaŭ*, pero como va delante de una oración le añadiremos la conjunción *ol*. En este caso *antaŭ* siempre se referirá a "antes en el tiempo", no nos referimos a ningún lugar.

En los ejemplos que hemos indicado anteriormente, en español la estructura era la siguiente:

Acción con un verbo (presente, pasado, futuro) + antes de + acción  
con un verbo en subjuntivo.

En esperanto la estructura es similar, solo que un poco más simple:

Acción con un verbo (as-tempo, is-tempo, os-tempo) + antaŭ ol + acción con un verbo (as-tempo, is-tempo, os-tempo).

Así, si nos referimos a una acción que ocurrió en el pasado:

- *Mi enamigiĝis al ŝi antaŭ ol mi konis ŝin persone.*

Me enamoré de ella antes de que yo la conociera personalmente.

(En este ejemplo las dos acciones "enamorarse" y "conocer" ocurren en el pasado, por lo que en las dos se utiliza el *is-tempo*).

- *Kiam li parolas rapide, li miksas ambaŭ lingvojn antaŭ ol li finas la unuan frazon.*

Cuando habla rápidamente mezcla ambas lenguas antes de que termine la primera frase.

(Como vemos las dos situaciones: "mezclar las lenguas" y "terminar la primera frase" suceden en el momento actual: *as-tempo*.)

- *Vi finos la studojn en la lernejo antaŭ ol vi tion konscios.*

Terminarás los estudios en la escuela antes de que te des cuenta.

(En este ejemplo las dos situaciones: "terminar los estudios" y "darse cuenta", suceden en el futuro, así que utilizaremos en esperanto el *os-tempo*).

Cuando nos encontramos dos frases y una de ellas comienza con antaŭ ol, utilizaremos el mismo tiempo verbal en ambas frases.

*Vi lernos esperanton antaŭ ol vi tion konscios.*

*(Aprenderás esperanto antes de que te des cuenta)*

Hemos dicho anteriormente que delante de cualquier forma verbal utilizaremos *antaŭ ol*, poníamos como ejemplo un infinitivo:

- *Senŝeligu la tomatojn antaŭ ol kuiru ilin.*  
Pela los tomates antes de cocinarlos.

Esto mismo también es aplicable a los participios. En español solemos decir frases con una estructura similar a esta:

- Hemos terminado la tarea antes de lo planeado.  
"Planeado" es el participio del verbo "planear".

En esperanto podemos también formar esa frase, pero no resulta necesario utilizar el "lo", ya que el participio incluye esa idea.

- *Ni finis la laboron antaŭ ol planite.*

El participio iría en pasado "ite", en tanto que estamos hablando de algo que sucedió y va con forma de adverbio "-e", puesto que actúa como complemento de un verbo: Finis / planite. Así, el participio con la terminación de adverbio da la idea de "lo...". Veamos más ejemplos:

- *Lia familio havis tiom da mono, ke li estis la plej riĉa eĉ antaŭ ol naskite.*

Su familia tenía tanto dinero, que él ya era el más rico incluso antes de nacer (antes de nacido).

- *Mi redonos al vi vian aŭtomobilon antaŭ ol promesite.*  
Te devolveré tu automóvil antes de lo prometido.

Para finalizar, y aunque ya lo hemos repetido varias veces, hay que recordar que delante de un verbo o de una oración no utilizaremos *antaŭ* sino *antaŭ ol*. Resulta necesario indicar también, que no sería incorrecto utilizar *antaŭ ke* (antes de que) o *antaŭ kiam* (antes de cuando). Sin embargo se trataría de un uso totalmente arcaico de la lengua esperanto, por lo que resulta desaconsejado.

*Ŝi venis ĉe mi antaŭ ol mi telefonis mian amikon.*

*Ŝi venis ĉe mi antaŭ ke mi telefonis mian amikon.*

*Ŝi venis ĉe mi antaŭ kiam mi telefonis mian amikon.*

Estos tres formas de iniciar una frase con "antes de que" serían correctas, pero es preferible la primera de ellas: *antaŭ ol*.

**BALADO DE KIU NENIAM VOJIS GRANADON**

Kiel foraj maroj, kampoj kaj montaroj!  
Novaj sunoj miras mian grizan kapon.  
Ne vojis mi Granadon.

Mia griza kapo, la perditaj jaroj.  
Trovu mi la oldajn forviŝitajn padojn.  
Ne vidis mi Granadon.

Al mi enmanigu verdan branĉon luman.  
Longe galupigu min per brido kurta.  
Ne venis mi Granadon.

Kiuj malamikoj la rund-vojojn setlas  
Kaj la klarajn eĥojn de l'aer' libera?  
Ne vojis mi Granadon.


Kiuj la ĝardenojn en prizonon metas  
Kaj la ŝpruc-parolon daŭre nun katenas?  
Ne vidis mi Granadon.

Venu, homoj, kiuj ne iris Granadon.  
Sango tie falis, min vokanta sango.  
Ne venis min Granado.

Sango tie falis el la frat' plej bona.  
Sango sur la mirtojn kaj la akvon kortan.  
Ne vojis mi Granadon.

El la frat' plej bona, sur la mirtajn branĉojn.  
Sango Genil-flua, Darro-flua sango.  
Ne vidis mi Granadon.

Se altas la turo, des pli la kuraĝo.  
Venu sur la monto, sur maroj kaj kampoj.  
Venus mi Granadon.



Rafael Alberti  
1902 - 1999



# NUNTEMPA VORTARO

## MALGRANDA VORTARO PRI BALOTOJ




Kandidatoj



Politikaj Partioj



Elektada Kampanjo



Elektosilento  
Antaŭbalotsilento  
Balotsilento  
Kampanjsilento



Listo de la elektantoj



Balot-paperoj



Elekto-budo




Identiga karto



Koverto kun  
balot-papero



Baloti



Balotujo

Prezidanto  
kaj  
Asistantoj



Balotejo



Elektantoj



Elnombrado de balotiloj

Partio	Voĉdonoj	Voĉoj	%
Partio de la Laborkomunistoj	100 000	100 000	100,00%
Partio de la Demokratoj	80 000	80 000	80,00%
Partio de la Libereco	60 000	60 000	60,00%
Partio de la Unio	40 000	40 000	40,00%
Partio de la Progreso	20 000	20 000	20,00%
Partio de la Justeco	10 000	10 000	10,00%
Partio de la Esperanto	5 000	5 000	5,00%
Partio de la Paco	3 000	3 000	3,00%
Partio de la Medio	2 000	2 000	2,00%
Partio de la Kulturo	1 000	1 000	1,00%
Partio de la Edukado	500	500	0,50%
Partio de la Scienco	250	250	0,25%
Partio de la Arto	100	100	0,10%
Partio de la Religio	50	50	0,05%
Partio de la Familo	25	25	0,025%
Partio de la Infanoj	10	10	0,01%
Partio de la Junularo	5	5	0,005%
Partio de la Senjoroj	2	2	0,002%
Partio de la Senjorinoj	1	1	0,001%

Proklami rezultaton

### ¿Qué diferencia hay entre *baloti* y *voĉdoni*?

Ambos verbos pueden traducirse como "votar", sin embargo tienen matices diferentes. *Voĉdoni* es dar el voto por una opción, decantarse por algo. *Baloti* también es votar por algo, pero utilizando un instrumento para llevar a cabo esa elección. Ese instrumento puede ser una papeleta, una bola con un color determinado, etc. Estos medios para votar se denominan en esperanto *balotilo*. Así, si se plantean varias opciones en una discusión: *mi voĉdonas por la unua opcio*, porque he llevado a cabo mi elección tan solo expresando mi opinión. Pero en unas elecciones políticas, donde se usan papeletas: *mi balotas por la partio A*.





## Folioj por Praktikado

### 30-a de aprilo, Internacia Tago de Ĵazo

Ĵazo estas muzika stilo, kiu evoluis en Usono **fine** de la 19-a jarcento. Ĵaz-muziko miksas elementojn de pluraj muzikstiloj per diversaj instrumentoj. Improvizado, kiam ludantoj kreas muzikon **surloke**, estas grava aspekto de ĵaza prezentado.

Sed **provi** difini ĵazon estas kiel provi difini Usonon: la renkontiĝo de kulturoj, la cikatroj de sklaveco; ĝi estas ideo, kiun neniu **unuopa** homo kreis kaj neniu posedas. Antaŭ **hiphopo**, antaŭ **rokenrolo**, ĵazo estis la originala muziko de la popolo.

Ĵazo naskiĝis en Nov-Orleano, Luiziano. Ĝi **komenciĝis** kiel la muziko de sklavoj. Sklavoj ne rajtis konservi siajn afrikajn identecojn aŭ kulturojn. Ili esprimis sin muzike **miksante** la sonojn el siaj hejmlandoj en Afriko aŭ Antiloj, la spiritan muzikon de preĝejoj, usonan popolmuzikon, kaj eŭropajn **klasikaĵojn**.

Malmultaj nigruloj en la pasinteco lernis kiel legi aŭ skribi muzikon. Ili devis kompensi tiun mankon ludante **laŭ-orele** kaj improvizante. Tio parte klarigas, kial **ekestis** tra la lando apartaj regionaj formoj de ĵazo.

Estas **multe da** diversaj opinioj, pri kiu **alportis** ĵazon al Eŭropo. Ofte okazis, ke blanka artisto prezentis la muzikon de nigraj artistoj **kvazaŭ** li mem verkis ĝin.

La fonografo estis la plej nova kreaĵo de la moderna teknologio komence de 1900, kaj tio helpis disvastigi la sonon. Blankaj kaj nigraj muzikistoj ofte koncertis eksterlande. Nigraj armeaj muzikistaroj koncertis tra la tuta mondo, disvastigante la sonon de ĵazo.

## > fine

Recuerda el juego que nos da el adverbio cuando hablamos en esperanto. A veces basta con colocar una palabra en su forma adverbial, es decir terminando en "-e", para darle una idea para la que en español necesitaríamos varias palabras. Así que *fine* se traduce por "al final". Por supuesto también podríamos haber utilizado *en la fino*, pero es más sencillo decirlo con una sola palabra: *fine*.

## > surloke

Seguimos con los adverbios, ya ves que *surloke* termina en "-e". En *surloke* hemos unido la preposición *sur* al sustantivo *loko*. Esta palabra expresa la idea de que algo ocurre "sobre el lugar".

## > provi

En esperanto hay dos verbos que pueden dar lugar a confusión a un hablante de español. Veamos cuáles son:

- Provi: probar, en el sentido de intentar, experimentar, ver que algo funciona.
- Pruvi: expresa la idea de demostrar, probar con lógica o razonamientos.

Veamos algunos ejemplos:

- *La prokuroro pruvis, ke la ŝtelisto murdis la viktimon.*  
El fiscal probó que el ladrón asesinó a la víctima.
- *Antaŭ la koncerto, la muzikistoj provas siajn instrumentojn.*  
Antes del concierto los músicos prueban sus instrumentos.
- *Estas pruvite, ke la tabako estas malbona por la sano.*  
Está demostrado (probado) que el tabaco es malo para la salud.
- *La mekanikisto provis la motoron de la aŭtomobilo.*  
El mecánico probó el motor del automóvil.

## > unuopa

El sufijo "-op" no es muy usado, pero hay que conocerlo. Se aplica a los numerales dando la idea de que algo sucede "en un grupo con un determinado número de componentes". Vamos a explicarlo de una manera más clara:

Es la idea que se expresa en español con la forma "de uno en uno"; "de dos en dos"... Podemos utilizar un adverbio, ej. *triope*: de tres en tres; *dekope*: de diez en diez. O como adjetivo *duopa marŝo*: una marcha de dos en dos.

En el ejemplo que aparece en el texto se indica *unuopa homo*, la idea que expresa es "un único hombre", literalmente "un hombre de uno en uno". Encontramos el sufijo *-op* en algunas palabras como:

- *unuopuloj*: sujetos considerados individualmente.
- *multopa grupo*: grupo compuesto por muchos componentes.

### > **hiphopo, rokenrolo.**

Habrás leído en multitud de ocasiones que la gramática del esperanto tiene 16 reglas fundamentales. Pues bien, veamos lo que dice el comienzo de la regla nº 15:

"Las palabras internacionales, esto es, aquellas palabras que la mayoría de las lenguas han tomado de una sola fuente, pasan al esperanto sin cambios, tan solo adaptándose a la ortografía de esta lengua."

¿Qué significa esto? Veamos, hay palabras que todas las lenguas toman de una única lengua, p.ej "rock 'n' roll". Esta palabra pasará al esperanto sin cambios, pero adaptándose a la ortografía de nuestra lengua, así sería *rokenrolo* (al ser un sustantivo es obligatorio que termine en "-o"). Lo mismo ocurre con el estilo de música "hip hop", que pasa al esperanto como *hiphopo*.

Por cierto, esto no solo ocurre en la lengua esperanto, también en el castellano, donde está aceptado el término "rocanrol". Vemos que la Real Academia de la Lengua ha seguido los mismos pasos que la regla 15 del esperanto, es decir, tomar un término aceptado internacionalmente, pero adaptándolo a la ortografía del castellano.

### > **komenciĝis**

Ya hemos dicho en muchas ocasiones que el verbo *komenci* es transitivo, es decir necesita obligatoriamente de un objeto al que se le da comienzo. Si lo que empieza es el propio sujeto, entonces tenemos que utilizar la forma reflexiva del verbo con el sufijo "-iĝ". La traducción literal de *komenciĝis* sería "se comenzó", pero podemos decir simplemente "comenzó". Veamos algunos ejemplos:

- *La laboristo komencis sian laboron*  
El trabajador comenzó su trabajo.
- *La festo komenciĝis kun granda surprizo.*  
La fiesta comenzó (se comenzó) con una gran sorpresa.

## > miksante

Los gerundios en esperanto se forman con las siguientes terminaciones:

- INTE, si es gerundio en pasado.  
*miksinte*: habiendo mezclado. Es decir, en el pasado.
- ANTE, si es gerundio en presente.  
*miksante*: mezclando. Expresa que la acción ocurre ahora.
- ONTE, si es gerundio en futuro.  
*miksonte*: habiendo de mezclar. Da idea de que ocurrirá en el futuro.

El gerundio actúa como un adverbio, por eso la terminación "-e".

## > klasikaĵojn

Recuerda que con el sufijo "-aĵ" concretamos o "cosificamos" algo. Veamos algunos ejemplos:

- *klasikaĵo*: una obra o una cosa clásica.
- *dolĉaĵo*: un dulce, una cosa dulce.
- *novaĵo*: una novedad, una cosa nueva.
- *glaciaĵo*: un helado, una cosa helada.

Referido a animales sería "carne de..."

- *porkaĵo*: carne de cerdo.
- *kokidaĵo*: carne de pollo.

Por sí solo *aĵo* significa "cosa".

## > laŭ-orele.

La preposición *laŭ* significa "según". También expresa la idea de "conforme a...". En este ejemplo aparece junto a *orelo* (oreja) y convertido en un adverbio, o más bien en una locución adverbial, porque está compuesto por varias palabras, en este caso unidas por un guión. Significa literalmente "conforme a la oreja", corresponde al español "de oído". Así: *ludi muzikon laŭ-orele*, se traduce por "tocar música de oído".

## > ekestis.

Ya hemos visto en anteriores ocasiones que el prefijo "ek-" significa "comenzar a...". La traducción literal del verbo *ekesti* sería "empezar a ser", dando la idea de "aparecer", "surgir". En el ejemplo se usa la forma en pasado (is), así *formoj de ĵazoj ekestis* podría traducirse por "surgieron estilos de jazz".

### > multe da

Ya hemos hablado en otras ocasiones del partitivo da. En esperanto podemos decir *multaj homoj* o *multe da homoj*; *multaj libroj* o *multe da libroj*.

### > alportis

Algunas preposiciones que siguen a verbos pueden incluso unirse a ellos, con el mismo significado en ambos casos. En este ejemplo podemos decir *porti al* con el significado de "llevar a" o *alporti*, expresando la misma idea. En el ejemplo el verbo *alporti* va en pasado (*alportis*).

### > kvazaŭ

Conjunción con el significado de "casi como si...". Veamos algunos ejemplos de su uso:

- *Li agadas kvazaŭ li estus la prezidanto.*  
El actua casi como si fuera el presidente.
- *Li kuras kvazaŭ li estus persekutita de leono.*  
El corre casi como si fuera perseguido por un león.

Hay que tener en cuenta un detalle muy importante de kvazaŭ. Cuando usamos esta conjunción nos referimos a que algo ocurre, pero en un sentido ideal, que no es real. En los ejemplos propuestos él no era el presidente y tampoco era perseguido por un león, aunque idealmente casi lo pareciera.

Por eso kvazaŭ es distinto de preskaŭ. Cuando usamos la conjunción preskaŭ (casi), lo que ocurre está muy cerca de ser real y puede llegar a serlo, no es para nada ideal. Veamos algunos ejemplos:

- *Li kuras kvazaŭ li estus persekutita de leono.*  
Él corre como si fuera perseguido por un león.  
(Expresa un hecho no real, porque en ningún momento fue perseguido por un león).
- *Dum sia vojaĝo en Afrikon, li preskaŭ estis persekutita de leono.*  
Durante su viaje a África, él casi fue perseguido por un león.  
(En este caso la persecución estuvo a punto de existir en la realidad, no fue algo ideal. No llegó a ocurrir pero estuvo a punto de suceder).



En la Aksarkio, regioneto oriente de la malaga provinco, troviĝas la vilaĝo *Cómpeta*, prononcu: "Kómpeta". Por atingi ĉi tiun vilaĝon estas necese ascendi pere de kurbo-plena ŝoseo ĝis 630 metroj sur la mar-nivelo. Eble la vojaĝo ne estas tre komforta, tamen aperas pejzaĝoj plenaj je arboj kaj klifoj. Fine, vi povos rigardi vilaĝon kun blankaj domoj en la suda flanko de monto. Pro sia starigo, *Cómpeta* estas konata kiel la kornico de la Suna Marbordo, el tie vi povos vidi samtempe maron kaj montaron.

*Blazono de  
Cómpeta*



Kvankam neniu arkeologia restaĝo aŭ dokumento tion atestas, oni diras, ke la origino de la vilaĝo troviĝas en romia loko nomita *Compita Orum*. Temis pri voj-kruciĝo kie romianoj okazigis festojn por peti la helpon de la laroj, romanaj dioj protektantajn difinitajn lokojn, ekz. vojojn.

La unua dokumento kie aperas *C6mpeta* datiĝas de la jaro 1487. Tiam oni sciigis al la Katolikaj Gereĝoj la lokojn konkeritajn proksime al *V6lez-M6laga*. Tuj post la konkero de ĉi tiu lasta urbo, la reprezentantoj de la islama enloĝantaro de la ĉirkaŭaĵoj, inter ili tiu de *C6mpeta*, promesis fidelecon al la Katolikaj Gereĝoj.

Post la kristana konkero de la vilaĝo kaj de la tuta antikva islama granada regno-lando, la islamanoj ribeliĝis inter la jaroj 1568 kaj 1571. *C6mpeta* aliĝis al islama flanko, tiel dum kelkaj jaroj tie oni luktis kontraŭ la armeo sendita de la kastilia reĝo. Tamen, en la jaro 1570 la kastiliaj trupoj definitive konkeris *C6mpeta*. Tiam, oni forpelis la islamajn enloĝantojn kaj la fruktodonajn bienojn oni disdonis al kastilianoj venintaj el



Sevilo, Kordovo kaj Granado. Tiamaj dokumentoj atestas, ke en *Cómpeta* oni produktis vinon, silko-raŭpojn kaj mielon. De tiam ĝis la 20-a jarcento la vilaĝo estis apenaŭ aro da domoj.

terkulturistoj kreskigas tropikajn fruktojn, kiel la avokadon.

## Monumentoj

- **Pendodomoj**



Dum la dua duono de la pasinta jarcento, la tuta provinco Malago enriĉiĝis dank'al turismo. Same okazis en *Cómpeta*. En ĉi tiun vilaĝon venis granda nombro da eksterlandanoj, ĉefe germanoj, britoj kaj danoj, kiuj rekonstruis antikvajn kamparajn domojn.

Nuntempe *Cómpeta* estas alloga vilaĝo kun 3.800 enloĝantoj, el kiuj 1.800 estas eksterlandanoj, do, turismo estas unu el la plej gravaj ekonomiaj resursoj. El la mezepoko oni ellaboras tie vinon kaj lastatempe

*Cómpeta* stariĝas ĉe krutaĵo, do, multaj konstruaĵoj fiksis siajn fundamentojn sur roko. Temas pri blankaj domoj pendumitaj el la monto.

- **Preĝejo de Sankta Isidro.**

*Cómpeta* estas kampara vilaĝo. Pro tio, el la religia vidpunkto de antaŭ kelkaj jarcentoj oni elstaras la kristanan sanktulon Sanktan Isidron, patrono de la terkulturistoj. Ĉe la placo *Vendimia*, tuj apud la pendodomoj, stariĝas belega preĝejo dediĉita al ĉi tiu sanktulo.

## • Preĝejo Nia Sinjorino de *Asunción*.

Ĉe la centra kvartalo stariĝas la plej grava preĝejo en la urbo. Konstruita en la jaro 1505 post dekreto de la reĝino Elizabeto la Katolika. Videblas el ĉiuj lokoj en la vilaĝo la turo de la preĝejo, 37 metroj, alte.



## Festoj

Kiel dirite, *Cómputa* produktas bongustan vinon, do, la 15-an de aŭgusto okazas *La Nokto de la Vino*, sendube temas pri la plej konata festo en la vilaĝo. La originojn de ĉi tiu festo estas eble trovi en la jaroj kiam familianoj adiaŭis terkulturistojn. En la monato aŭgusto ili marŝis en la kamparon por uvo-rikolti kaj poste produkti vinon. En la jaro 1973 oni proponis okazigi feston por memori tiun antikvan kutimon.

Tiel, la 15-an de aŭgusto okazas la Nokto de la Vino, aŭ pli taŭge diri: "la tago de la vino", ĉar aktoj okazas dum la tuta tago. La tago komenciĝas per tretado de vinberoj en tinegoj, poste ĉiuj estas invititaj trinki muskat-vinon produktitan en la vilaĝo. Dum nokte okazas folkloro festo kun dancado, flamenka kantado kaj deklamado de poemoj.

La 3-an de majo okazas la **Festo de la Majaj Krucoj**. En tiu tago, estas starigitaj krucoj el floroj sur ĉiuj stratoj kaj placoj. Tra la vilaĝo muzikistaro marŝas, ili finas la paradon ĉe la plej alta pinto de la vilaĝo. Tie oni starigas la "Krucon de la Monto", kiu memoras forpasintajn familianojn.



## Gastronomio

La plej konataj manĝaĵoj de *Cómputa* estas la frititaj paneroj, supo de fenoloj kaj fritita kaprido kun ajloj. En la vilaĝo oni produktas mondfaman mosktaelon, vino farita el apartaj specoj de vinberoj kun tre agrabla aromo.

*Venontnumere*  
*Turismi en ... ANDÚJAR (Jaeno)*



**Andaluzia Esperanto-Unuiĝo:**  
**en la reto: [www.esperanto.ac](http://www.esperanto.ac)**  
**en Twitter: [@AndaluzioEO](https://twitter.com/AndaluzioEO)**

**Kunlaboru kun la disvastigo de la internacia lingvo en Andaluzio kaj de la andaluzia kulturo en la tuta mondo pere de esperanto.**

**Aliĝu al A.E.U. (Pliaj informoj sur la paĝo 10-a)**

**Asociación Andaluza de Esperanto**  
**en internet: [www.esperanto.ac](http://www.esperanto.ac)**  
**en Twitter: [@AndaluzioEO](https://twitter.com/AndaluzioEO)**

**Colabore con la difusión de la lengua internacional en Andalucía y de la cultura andaluza en todo el mundo por medio del esperanto.**

**Hágase socio de A.E.U. (Más información en la página 10)**



## ***Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio.***

### ***FRANCISCO GODOY CALVO, socialisto, sindikatisto kaj esperantisto en Almerio***

Kvankam ne tre bone konata, la movado favore al la internacia lingvo esperanto disvolviĝis en Almerio antaŭ ol en aliaj andaluziaj provincoj. La unua grupo fondiĝis en la jaro 1908 kaj en ĝi renkontiĝis elstaraj profesiuloj, kiel kuracistoj kaj inĝenieroj, kaj ankaŭ gravaj sindikatistoj. Inter ili, elstaraj membroj de la socialisma partio kaj poste de la komunisma partio, memoru, ke ĉi tiu partio ne fondiĝis en Hispanio ĝis la jaro 1921.

Unu el tiuj aktivaj sindikatistoj, membro de la unua estraro de la grupo de esperanto de Almerio en la jaro 1908 estis Francisco Godoy Calvo. Li naskiĝis en la almeria vilaĝo *Fondón*, en la jaro 1863. Lia patro forpasis kiam Francisco apenaŭ estis 7-jaraĝa, do, li devis tuj eklabori por havigi monon en sian hejmon. Komence li laboris en faden-fabriko, poste kiel masonisto, tamen, li baldaŭ iniciĝis en la industrio pri konstruado de bareloj. En tiuj jaroj, en Almerio ekzistis grava industrio pri konstruado de tiuj ujoj, kiuj entenis vinberojn. Tiun frukton oni eksportis en Eŭropon kaj Amerikon.



Francisco Godoy Calvo  
1863 - 1912

Kiel barelisto li atingis la plej altan lertecon en la profesio. Ekde la jaro 1894 li eĉ atingis, ke ĉiuj bareloj de li konstruitaj surhavis stampitan sigelon kun la nomo "Godoy". Same, pro sia famo li estis elektita kiel reprezentanto de la barelistoj en la diskutoj kun la mastroj pri la labor-kondiĉoj, ĉefe rilate la atingon de plu justa salajro.

Tiu agado kiel reprezentanto de la laboristoj irigis lin en la sindikatismon. Li estris la korporacion de barelistoj de Almerio, ĉi tiu asocio, kune kun tiu

de lignaĵistoj, kreis la unuan komitaton de la socialisma partio PSOE (Hispana Socialisma Laborista Partio) en Almerio, tie Francisco Godoy fariĝis la unua prezidanto de la almeria komitato de la partio PSOE. Li tre amikiĝis kun Pablo Iglesias, fondito de la socialisma partio PSOE kaj ankaŭ de la sindikato UGT (Ĝenerala Unuiĝo de Laboristoj).

El la politika vidpunkto, Francisco Godoy estis tre radikala rilate sociajn rajtoj kaj religion. Laŭ li mem diris, li ĉiam luktis kontraŭ la maljustecoj kaj la malriĉeco. Same, li ĉiam favoris al la kulturigo de infanoj kaj laboristoj, certe pro la fakto, ke li mem ne povis ĉeesti dum sian infan-aĝo al normala lernejo. Pro tio, li devis sekvi elementajn studojn dum noktaj klasoj, ĉar la tuta tago, eĉ dimanĉe laŭ li mem diris, li devis labori. Tamen, li estis tre klera homo.

Kaj rilate al esperanto? Nu, kiel dirite, esperantismo en Almerio ekorganizigis en la jaro 1908.

Unu jaro antaŭe, prestiĝa almeria profesoro S-ro Felipe Oña y Luque, fondinto de la privata lernejo "San Sebastián", proponis en almeria ĵurnalo la oportunecon instrui la internacian lingvon de la Doktoro Zamenhof en la lernejoj. Alie, en la jaro 1908 la komerca ĉambro de Almerio jam instruis esperanton. La unua E-organizaĵo en Almerio fondiĝis en la jaro 1908, la unua prezidanto estis S-ro Francisco Cordero Meca, prestiĝa almeria kuracisto, pri li kaj pri lia filo ni parolos en proksima numero de nia revuo.

En tiu nova grupo Francisco Godoy Calvo agadis kiel voĉdonanto. Oni ne scias kiam kaj kie li lernis aŭ interesiĝis pri la internacia lingvo. Sendube liaj deziroj favorigi la kulturigon de ĉiuj sociaj klasoj, helpis sian emon diskonigi novajn sciencojn kaj konojn al ĉiuj, ankaŭ al tiuj kiuj ne povis ĉeesti la lernejojn pro malriĉeco. Tion li mem spertis en sia vivo.



La haveno de Almerio estis la centro de la eksportado de vin-beroj konservitaj ene de bareloj.





Francisco Godoy Calvo (dekstren) kun helpanto en sia laboro kiel konstruanto de bareloj.

  
***Esperanto,  
ponto inter popoloj***



**Ponto de la Drako en Alcalá de Guadaíra (Sevilo)  
Jaro 2007**





$$E = mc^2$$

*Scienca Angulo*


## *Mesaĝo en la stelojn*

La 16-an de novembro 1974, el la observatorio de Arecibo en Portoriko, oni sendis mesaĝon al eblaj eksterteruloj. La ĉefa aŭtoro de tiu mesaĝo estis la astronomo kaj astrofizikisto Frank Drake. La mesaĝo enhavis informojn pri la biologio kaj la anatomio de la homoj, ankaŭ informojn pri la planedo Tero. La celo de la mesaĝo estis la stel-amaso Messier-13, en la konstelacio Heraklo. Tiu stel-amaso apartenas al nia galaksio "Lakta Vojo" kaj ĝi troviĝas je 22.800 lumjaroj kaj konsistas el 300.000 steloj.

Hodiaŭ, preskaŭ 50 jaroj poste, la observatorio de Arecibo jam ne funkcias. En la jaro 2014 tertremo damaĝis kablono. En 2020, post alia tertremo, fermiĝis la observatorio por inspektado. Kroma minaco estas la tropikaj ŝtormoj, tiel, la huragano *Isaias* provokis gravajn damaĝojn. Post konsultado kun spertuloj, la aŭtoritatoj decidis fermi definitive la teleskopon kaj plani ties malkonstruon.

Lastatempe aperis nova projekto sub la titolo "Lumturo en la galaksio", publikigita de scienca teamo sub la

gvidado de Jonathan Jiang, esploristo de la reaktora departemento de la usona NASA (Nacia Aeronautika kaj Kosma Administracio). Ĉi tiu teamo proponis sendi mesaĝon el la Teleskopo *Array* en Kalifornio aŭ el la radio-teleskopio *FAST* en Ĉinio.



Mesaĝo sendita eksteren en la jaro 1974

Laŭ ĉi tiu nova projekto, la mesaĝo sendota enhavos bazajn konceptojn pri kemio, biologio kaj matematiko. Oni kalkulas, ke la mesaĝo devus esti sendita inter la monatoj marto kaj oktobro, kiam la tero troviĝas en angulo de 90 gradoj rilate la sunon kaj la celatan galaksion. La celo de la mesaĝo estos stel-amaso en la centro de la Lakta Vojo.

La ĉefa solvenda afero de la projekto estas decidi kiel transskribi la mesaĝon. Ĉiuj lingvoj kaj eĉ la ciferoj mem apartenas al la homa pens-maniero, do eblaj eksterteranoj ne necese komprenus ilin. Tamen, la binaraj kombinaĵoj, uzantaj nur du valorojn aŭ simbolojn (nul kaj unu), ebligus malkomponi kiun ajn mesaĝon laŭ elementaj datenoj, tio estas: vera/malvera; konektiva/malkonektiva. Sed malgraŭ ĉi tiu elementa transskribado, ne necese ekstertera inteligenta civilizacio komprenus ĝin, aŭ eĉ ekfunkciigi la reproduktilon.

Rilate la strukturon de la mesaĝo, ĝi komenciĝas per prima nombro, tiel oni elstaras la ne-naturan originon de la mesaĝo. Poste, aperas la bazo de nia nombra sistemo, de 0 ĝis 10, poste oni mencias bazajn elementajn operaciojn. El tie aperas bazaj matematikaj operacioj, kiel adicioj kaj subtrahoj.

Sekve, oni aperigas kemiajn informojn, ekzemple la strukturon de atomo de hidrogeno, la periodan tabelon kaj la strukturo, de DNA (DeoksiriboNuklea Acido).

Fine estas citataj la koncepto pri tempo, por sciigi pri la momento kiam oni sendis la mesaĝon. Bildoj ankaŭ povas esti sendataj, tiel aperos bildoj de viro kaj virino, karto de nia planedo kaj de la suna sistemo, por montri nian lokon en la galaksio. Fine, oni invitas respondi la mesaĝon, ĉar oni mencias la radio-frekvencon uzotan, se oni deziras respondi el tiu ekstertera civilizacio.

Komprenoble jam aperis kontraŭuloj al ĉi tiu projekto. Ili pensas, ke temas pri tempo-perdo kaj misuzo de resursoj. Sed la ĉefa kialo sciigita por rifuzi ĉi tiun projekton baziĝas sur la fakto, ke pere de ĝi oni havigas informojn pri la homa specio al ebla ekstera kosma agresanto. Jen la scenaro de kelkaj hollywoodaj filmoj, *ĉu ne?*





# Flamenko

## La "Garrotín"

Ne necese ĉiuj flamenkaj kantaĵoj aperis en Andaluzio kaj ankaŭ ne ĉiuj ili komenciĝis ene de la cigana kulturo. Unu el ili estas la kant-stilo "Garrotín". Temas pri kantaĵo de la hispana regiono Asturio kaj de la Leona Regnolando. Ĉi tiu stilo eniris en la flamenkan enciklopedion kiam katalunaj ciganoj ekludis ĝin.

Temas pri kantaĵo montranta ĝojon kaj feston. Ties temoj tute ne rilatas al damaĝoj, petoj kaj ili ankaŭ ne rilatas al la eterna temo: amo/malamo. La tekstoj de ĉi tiu kant-stilo estas amuzaj kaj la enhavo tre simpla.

Pastora Pavón, *La Niña de los Peines*, aktualigis la "garrotín", poste aliaj grandaj majstroj, kiel Antonio Mairena, ludis ĉi tiun flamenkan kantaĵon.

Pri ĝia strukturo, la garrotín estas formata de 4 oksilabaj versoj, kun la unua ripetita. La dua kaj la kvara metas rimon fine de la versoj. Post ĉiu strofo, ripetiĝas rekantaĵo. La nomo "garrotín" venas el ofta rekantaĵo: "con el garrotín, con el garrotán".

Jen fama kantaĵo de la flamenka stilo "Garrotín". La aŭtoro estis Curro Malena (Lebriho, 1945).

*Tuj apud rivero granda,  
tuj apud rivero granda,  
mia patrino kuŝis min,  
ĉe la kvartalo Triana.  
Tio estis Dia dezir'.*

*Je la garrotín,  
je la garrotán.  
Ege ege flanke de  
Sankta Johan'.*

*Mia amikin' karega  
ne pensu pri geedziĝo.  
Sciu, ke arda pasio  
nuligas ĉiujn konsciojn.*

*Je la garrotín,  
je la garrotán.  
Ege ege flanke de  
Sankta Johan'.*

*Se vi vendas fajnan kruĉon,  
se vi vendas fajnan kruĉon  
kaj vi verŝas akvon el ĝi,  
mirakle fariĝos l'akvo  
la plej delicega vin'.*

*Je la garrotín,  
je la garrotán.  
Ege ege flanke de  
Sankta Johan'.*

*Ĉu vi estas preta veti?  
Mi lanĉas jenan proponon:  
se vi min petas labori,  
certe mi tuj eklaboros.*

*Je la garrotín,  
je la garrotán.  
Ege ege flanke de  
Sankta Johan'.*



En Youtube estas eble aŭdi ĉi tiun kantaĵojn. Kantas José Sánchez Bernal "Naranjito de Triana" (Sevilo 1933-2002) ĉe:

<https://www.youtube.com/watch?v=QCsm79MwAke>

## FLAMENKA VORTARO

- **Cantar a palo seco** (Kanti senmuzike): Ludi kantaĵon sen gitara akompanado.
- **Afilla** (Raŭka): En la kantaĵoj, tiu tipo de voĉo en kiu raŭkeco estas la karakterizaĵo.
- **Arrastrar** (Ludi rapide kaj seninterrompe la gitar-kordojn): Tekniko en la ludado de flamenka gitaro, laŭ kiu la gitaristo, per sia montr-fingro, ludas rapide la kordojn, de la unua ĝis la sesa, ne levante la alian manon el la gitar-kolo.
- **Ayeo** (Veado): Iu diris, ke temas pri la rita kaj sakrala krio de la flamenka arto. Temas pri interjekcioj lanĉitaj de la kantisto, ĝenerale en la komenco de la luado. Ili utilas por klarigi la voĉon kaj altiri la atenton de la aŭskultantoj.



# *Fervojista Angulo*

## *La Fervoja Andaluza Kompanio 1877-1936*

Samtempe al la konstruo de la unuaj fervojaj linioj en Hispanio, aperis privataj kompanioj kiuj starigis kaj administris tiujn fervojojn. Verdire, ne ekzistis en la lando granda fervojkompanio por la tuta teritorio, tiel, ĉiu el ili regis unu aŭ kelkajn liniojn.

En la jaro 1877, du malagaj entreprenistoj, Jorge Loring kaj Joaquín de la Gándara, kiuj jam mastris kelkajn malgrandajn fervojajn liniojn, fondis la *"Compañía de los Ferrocarriles Andaluces"* (Kompanio de Andaluziaj Fervojoj). La kompanio fondiĝis dum la lastaj jaroj de la regado de Elizabeto la 2-a, tiam okazis en Hispanio granda ekonomia krizo. Do, malgrandaj fervojaj kompanioj unuiĝis kun la celo krei alian pli

grandan. La sidejo de la andaluza kompanio troviĝis en Malago, kvankam el la leĝa vidpunkto oni registris ĝin en Madrido.

La kompanio kreskis rapide, tiel post kelkaj jaroj, CAF estis la tria plej grava en Hispanio, post "Nordaj Fervojoj" kaj la kompanio "MZA" (akronimo de la urboj Madrido-Zaragoza-Alakanto). La ĉefaj linioj de CAF estis Kordovo-Malago, Granado-Bobadilla, Sevilo-Kadizo, Jerez-Sanlúcar, Utrera-Osuna kaj Osuna-La Roda, kune kun malgranda linio ekster Andaluzio, inter Murcio kaj Alakanto.

Entute la fervojoj de la andaluza kompanio trakuris 700 kilometrojn. Averaĝe, pli ol kvar milionoj da





Simbolo de la Kompanio de Andaluziaj Fervojoj

vojaĝantoj uzis la servojn de ĉi tiu kompanio jare.

Unu el la ĉefaj celoj de CFA estis la mastrumado de la linio Kordovo-Sevilo, tamen ĉi tiu linio apartenis al la kompanio MZA, kiu konstruis la antikvan stacidomon de Placo de Armas en Sevilo. Se iu memoras tiun antikvan stacidomon en la andaluzia ĉefurbo, sur la konstruaĵo aperis grandlitere la nomo MZA, ĉar en tiuj jaroj, ne nur la fervojo, sed ankaŭ stacidomoj, apartenis al la fervojaj kompanioj.

CFA disvolviĝis sufiĉe bone ghis la fino de la 20 jardeko, tamen ekde tiam la negoco fiaskis kaj en la monato majo 1936, du jaroj antaŭ la ekigo de la hispana civila milito, la registaro alproprigis la andaluzian kompanion al la Nacia Kompanio de la Okcidentaj Fervojoj. Naskiĝis tim la Kompanio de Okcidentaj kaj Andaluziaj Fervojoj. Kun la komenco de la milito la ŝtato mem decidis aministri kaj ekspluati rekte ĉi tiun kompanio. Kaj en la jaro 1941 la kompanio kune kun aliaj integriĝis en la tiam naskita RENFE.



-  Fervojaj linioj de la Andaluzia Kompanio.
-  Fervojaj linioj de la Kompanio MZA.



Hispana Amikaro de Fervojistoj  
Esperantistaj

*fervojista@esperanto.ac*

# Nun Ni

## Infanoj

### LA FAZOJ DE LA LUNO

La luno estas la sola natura satelito de nia planedo. La distanco inter Tero kaj luno estas 385.000 kilometroj, tiel, vojaĝo per raketo daŭras tri tagojn. La luno rondiras ĉirkaŭ nia planedo, tiu movo nomiĝas luna orbito. Unu orbito daŭras 28 (dudek ok) tagojn. Dum tiuj tagoj, kompreneble, la luno ne ŝanĝiĝas, tamen, el la Tero ni vidas nian sateliton laŭ diversaj formoj dum tiuj 28 tagoj.

Do, la reflektado de la suna lumo sur la luno ŝanĝas la videblan aspekton de nia satelito. Memoru, ke luno mem ne elsendas lumon, sed reflektas la lumon de la suno.

#### • PLENLUNO.

La luno estas plene prilumata kaj ĝi estas tre bone videbla.

#### • NOVLUNO.

La luno estas apenaŭ videbla.

#### • KVARONLUNO.

Ĉiu el la du fazoj de la luno, dum kiu oni vidas ĝin nur parte.


*Kreskanta luno:* post novluno.

*Malkreskanta luno:* post plenluno.

La luno esas la sola astro, al kiu vojaĝis homoj, kaj sur kiu homoj surfaciĝis. La 21-an de julio 1969, la astronautoj Neil Armstrong kaj Buzz Aldrin surluniĝis. Ili estis la unuaj homoj, kiuj vizitis "alian mondon".

Kaj vi? Ĉu vi deziras vojaĝi en la lunon?





*Por helpi konstrui la panelojn de la Internacia Kosmostacio, vi devos meti la nomojn de la apudaj bildoj ene de la kvadratoj.*

Nun, la horo D-20... la ekflugo okazos post 20 minutoj! Post milionoj da pruvoj kaj jaroj da esplorado, jam estas preta raketo por vojaĝi tra la spaco. Interne, homoj regos la kontrolilojn. La cistenoj estas plenaj de likvigita hidrogeno... ĉiu detalo estas kontrolita kaj rekontrolita. La alir-platformo jam retiriĝis ... kaj nun, nenio moviĝas krom la montriĵoj de la horloĝo... ĝis la atingo de la ĝusta horo D. Post 20 minutoj, kvin homoj foriros en la spacon, kvin homoj komencos

## ...VOJAĜON EN LA NEKONATECON !

Scienc-fikcia  
Komikso

Bonŝancon Prof. Oppenheim !  
Vi nun skribas la Historion.  
Dio akompanu vin!

Ĝis baldaŭ Erik! Sekvu  
nin senĉese per la ra-  
daro. Ni revenos  
baldaŭ.

Jes, Profesoro.  
Bonŝancon al vi  
kaj al viaj kura-  
ĝaj kunuloj.

WHIRRRRRRRR  
CLANG!

D minus 1 minuto!  
Je viaj lokoj!  
30 sekundoj... 20  
sekundoj... 10.




Enŝaltu la  
atomajn  
akcelilojn!



5 sekundoj. Mal-  
bremu turbinojn!



Unu  
sekundo.  
Raketoj  
FOR!



Konektu la aŭtomatan  
piloton! Ni elteri-  
ĝis perfekte.  
Eble ni perdos la  
konscion pro la  
G-forto.

*Nun, la ra-  
keto, simi-  
la al kraĵo-  
no, flugas  
paralele al  
la planedo.*

*Ĝi rondiras  
centrifuge  
la plane-  
don pli kaj  
pli rapide.*



Konektu  
la helpajn  
motorojn!



Jam malplena la ĉefa hidrogena cisterno, ĝi elsaltiĝis kaj rapide falis sur la surfaceton.

Tiam ekfunkciiĝis la kroma cisterno kaj la raketo iris pli kaj pli rapide. Fine, la stelŝipo liberiĝis de la gravita forto.



Sekvu la koordinatojn kaj elsaltu la motorojn. Ni jam eliris el la gravita kampo.



Liberiĝita de la gravita forto la stelŝipon atingis ekstreman potencon. Ĝi komencis vojaĝon en la nekonatecon.



Dume, ene de la ŝipo okazis strangaj faktoj...

Ha! Sen gravito ni povas ŝvebi en la spaco. Estos interese vidi kio okazas se oni deziras plenigi glason per akvo.



Ho, ho! La akvo eliris el la botelo, sed kiel mi povos trinki ĉi tiujn ŝvebantajn akvajn bobelojn?

Tre simple. Uzu pajleron!




Baldaŭ la sci-volo pri la manko de gravito malaperis. Sed ĉi tiu nova situacio ankaŭ povas kaŭzi problemojn.

Mildiable! Kie estas la tenaĵoj?



Post monatoj la stelŝipo baldaŭ atingos sian celon: Planedon X




Tuj ni eniros en gravitan kampon. Ŝaltu la atomajn motorojn kaj preparu la entireblajn flugilojn!





Ĵus disfalditaj laflugiloj, la spaco-ŝipo moderi-  
gas sian rapidon kaj ĝi glitas enla atmosfero. Ĝi  
ekflugas paralele al la planeda surfaco.



*Kaj fine, la ŝipo, helpita de siaj raketoj, malrapide starigas sian voston sur la surfaco.*



Elŝaltu la se-  
san kaj kvinan  
motorojn. Ak-  
celu bufrojn!

Rigardu! Kiel prognoze, la pla-  
nedo estas kovrita de kreskantaj  
planktoj. Kaj vidu..... SUBEN !!



TIEN !!!

Restaĵoj de stratoj kaj ŝoseoj  
inter la vegetalaro! Sendube  
ŝpuroj de civilizacio!



Ŝipanaro,  
atentu!


Ni surteriĝos sur tiu nuda  
spaco, sur tiu insulo inter du  
malgrandaj riveroj. Ligiĝu  
per la sekurzono



Elŝaltu la  
motorojn. Jen ni!







La pruvoj montras, ke la atmosfero estas simila al tiu de nia planedo. Do, ni povas eliri el la ŝipo kaj, zorgeme, moviĝi tra la eksterajo.

Ho! Fine mi povas promenadi.

He! Rigardu!

Kion vi vidis?

Ho! mi ne scias.... ĉu eble grandan giganton ene de la arbustaro. Ĝi moviĝis!

Mi vidis nenion.

Eble mi estas iomete nervoza.

Venu! Ni instalos la ekipajaron.

Profesoro! Dum la ekipoj estas instalataj, ni ŝatus esplori la ĉirkaŭaĵojn kaj preni datumojn.

Bona ideo! Tamen, ne iru tro fore!

Vidu, ĉio ĉirkaŭ ni pravas, ke ĉi tie ekzistis inteligenta civilizacio. Eĉ tiu granda strato-lampo indikas, ke ĉi tie mem troviĝis longa avenuo.

Rigardu, la metalo estis fleksita kaj tordita. Sendube okazis grandega detruo. Ĉi fotografios ĉion detale.

Ĉi tie troviĝas strukturo en sufiĉe bona stato. Ni eniru por ĵeti rapidan rigardon. Ho, la ŝtuparo estas apenaŭ alirebla.

Kia silento! Ĉi tie jam ne ekzistas vivuloj Nur aŭdeblas vento kaj folioj.

Rigardu ĉi lokon! Kia malordo! En aliaj tempoj, eble ĝi estis io simila al biblioteko. Miloj da libroj tute detruitaj.

Sendube temis pri tre inteligenta civilizacio. Mi prenos kelkajn librojn por deĉifri ilin kaj scii kiuj ili estis.



Bonŝance! Mi trovis libron kun mikrofilmoj. Ene de ili aperas ĵurnaloj de ĉi civilizacio. Ni scios kio okazis

*Kio estas tio?*



Io moviĝis tie. Mi aŭdis ĝin sufiĉe bone.

Mi povas supozi, ke temas pri io danĝera.



Jen pliaj du. Ni tuj revenu en la ŝipon!

Atentu! Persekutas nin malamikaj gigantoj. Ĉiuj eniru en la ŝipon rapide! **TUJ!**



Ili ĵetis ŝtonojn kontraŭ nin. Ĉiuj eniru nun vi Profesoro.

*Ve!*

*Ekprenu lin!*



Prenita!

Fermu tuj la lukon!

Rigardu tien, mal-supren!



Kia mizera kaj abomeninda raso loĝas ĉi tie.

Ni ne domaĝis ilin. Kial ili nin atakis?

Ili klopodas faligi la ŝipon!





Profesoro, ĉu vi fartas bone?

Jes, la ŝtono ne estis tro granda. Ni devas foriri tuj! Ni jam plenumis nian komision. Ĉiu postenen!



Kiel ni povas ŝalti la motorojn kaj ne mortigi ĉiujn ilin?

Temas pri terura decido, tamen ili povas damaĝi nian ŝipon kiam ajn. *Ekŝaltu la atomajn motorojn!*



Raketoj for!!!

Post kelkaj horoj la ŝipo ree vojaĝas tra la spaco. Tiu sovaĝa planedo restis malantaŭe.

Nu, knaboj. Ni revenas hejmen. Ĉu vi sukcesis deĉifri la enhavon de tiuj libroj?



Jes, profesoro. La lingvo uzita estas tre simpla. Krome, ili enhavas centojn da fotografajoj. Ŝajnas, ke en la planedo floris prospera kaj tre civilizacio.

... la nivelo de la vivteno estis tre alta kaj la planedo posedis sufiĉajn naturajn resursojn. Tamen la enloĝantaro iom post iom kverelis inter si. Ili inventis novajn kaj pli potencajn armilojn. Ili estis kapablaj murdigi milionojn da homoj en unu sekundo. Kiam oni presis ĉi tiun libron kuris la 21-a jarcento kaj terura atoma milito estis okazanta. Tiu milito ĉion detruis kaj preskaŭ ĉiuj ili pereis. Jes, tio okazis en la komenco de ilia 21-a jarcento kaj tiu planedo, la planedo kie ni surterigis antaŭ kelkaj horoj nomiĝis...



La Tero!



# Andaluza Kuirarto

## Malaga Salato

En Andaluzio dum somero, oni evitas la varmajn manĝaĵojn. Tiel, en nia lando abundas malvarmaj supoj, kiel gazpaĉo kaj *ajoblanco*, kaj freŝaj salatoj, kiuj estas pretaj rapide kaj facile.

Unu el tiuj salatoj estas tipa en la urbo Malago, do, temas pri la "malaga salato". Jen manĝaĵo kie estas eble trovi kontraston de koloroj, gustoj kaj saporoj. En la "malaga salato" vi trovas fiŝon, fruktojn kaj terpomojn. Ĉi ĉio kondimentita de la plej altkvalita oliv-oleo.

La "malaga salato" estas tre facile aranĝebla manĝaĵo. Unue, estas necese diri, ke ne-salita moruo estas unu el la ĉefaj ingrediencoj. Do, se vi disponas nur pri saligita moruo, estos necese subakvigi ĝin dum almenaŭ 24 horoj. Nur ĉi tiel, saligita moruo perdos grandparte la tutan salon.

### Jen la ingrediencoj:

- 2 terpomoj, prefere ne-grandaj.
- Unu oranĝo.
- 2 ovoj.
- Cepeto.
- 150 gramoj da despecigita gado.
- Nigraj olivoj (kelkaj).


- Oliv-oleo.
- Vinagro.
- Salo



Oranĝo



Terpomoj



Ovoj



Cepeto



Nigraj olivoj

Despecigita ne-salita moruo



Oliv-oleo



Salo

Vinagro



## Kaj jen la preparado:

Kiel dirite, unue estos necese disponi pri despecigita ne-salita moruo. Se vi trovas nur salitan moruon, vi devos subakviĝi ĝin dum 24 horoj, ankaŭ ŝanĝu almenaŭ trifoje la akvon dum tiu tempo. Tamen, jam estas facile trovi ne-salitan moruon, eĉ jam despecigita, en multaj vendejoj.

1) Boligu du terpomojn, atentu, ne sen-ŝeligu ilin. Jam boligitaj estos pli facile sen-ŝeligi ilin. Boligu ilin, ĝis kiam la terpomoj estas iomete molaj, uzu forkon por konstati tion.

2) Boligu du ovojn. La akvo devas boli dum 10 minutoj. Post la boligo, atendu ĝis kiam la ovoj estas malvarmaj por sen-ŝeligi ilin.

3) Metu la moruon despecigitan ene de poto kun iom da akvo. Boligu ĝin dum kelkaj minutoj.

4) Post sen-ŝeligi la boligitajn terpomojn, distranĉu ilin laŭ malgrandaj pecoj. Faru same kun la ovoj. Miksu terpomojn kaj ovojn ene de salatujo.

5) Distranĉu la cepeton laŭ tre malgrandaj pecetoj. Aldonu ĝin sur la antaŭa miksaĵo de terpomoj kaj ovoj.

6) Sen-ŝeligu la oranĝon. Distranĉu ĝin. Atentu, evitu la blankan parton de la oranĝo, kiu troviĝas ĝuste sub la ŝelo. Aldonu tiujn oranĝajn pecetojn en la salatujojn. Aldonu ankaŭ la nigrajn olivojn.

7) Jam boligita la ne-salita moruo, distranĉu ĝin. Antaŭe vi devis demeti la eblajn malgrandajn fiŝ-ostojn. Aldonu ĝin en la salatujojn.

8) Kondimentu per oliv-oleo, salo kaj vinagro laŭ via volo. Miksu ĉion kaj...

**BONAN APETITON !**



# Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio



La *INDALO*



Eksterlandaj vojaĝantoj tra Andaluzio dum la 19-a jarcento, ĉefe britoj kaj francoj -konataj kiel *romantikaj vojaĝantoj*-sciigis, ke en multaj domoj de la vilaĝo Mojácar (prononcu: *Mohákar*), provinco Almerio, oni desegnis strangan simbolon, temis pri la "pupo" aŭ pupeto de Mojácar. Laŭ la tradicio, ĉi tiu simbolo, desegnita sur la faŝado de konstruaĵoj, evitis malbonan fortunon kaj ĉefe fulmo-tondrojn. La pupo de Mojácar trakuris generaciojn, tamen la deveno de la figuro estis tute ne-konata dum multaj jarcentoj.



En la jaro 1898 almeria arkeologo, Antonio Góngora y Martínez, trovis en la *Cueva de los Letreros*, groto proksime al la vilaĝo Vélez-Blanco (prononcu: *Véles-Blánko*), surrokan pentraĵojn. Unu el ili montris tiun saman figuron. Evidente, la nomo mem de la groto "*de los Letreros*", esperantigita "de la Skribaĵoj", pravigis la fakton, ke ĝi estis bone konita de la najbaraj vilaĝanoj, ĉar tiu sama simbolo estis amase reprezentita dum jarcentoj.

Laŭ esploroj, la simbolo apartenas al la Bronza Epoko aŭ al la malfrua Neolitiko, proksimume en la jaro 2.500 a.K. Kion reprezentas ĉi tiun simbolon?

Diversajn opiniojn oni proponis pri la ebla signifo de la "pupeto de Mojácar". La plej simpla, eble la plej prava, asertas, ke la simbolo reprezentas homon kun pafarko. Temus, do, pri ĉasisto aŭ luktanto kontraŭ malbonaj spiritoj. Aliaj pli signifo-plenaj teorioj diras, ke la simbolo povus reprezenti pakton inter



homoj kaj dioj por eviti pluvegojn kaj inundojn, eĉ oni asertis, ke la duoncirklo sur la pupo estus io simila al ĉielarko. Aliaj esploristoj opinias, ke ĝi reprezentas la agrikulturon kiel donacon al la homoj fare de la dioj, tiel la duoncirklo reprezentus la ĉielon kiun provizas pri akvo al la tero por kreskigi la fruktojn.



Originala pupo trovita en la groto

Rilate la nomon de la figuro, kiel dirite, komence ĝi estis konata kun simpla nomo "la pupo aŭ la pupeto de Mojácar". En la mezo de la pasinta jarcento, kultura movado de la provinco Almerio, sub la gvidado de la verkisto Jesús de Perceval, uzis la *pupon* kiel simbolo de tiu nova movado. Tiu kultura grupo adoptis la nomon "*Movimiento Indaliano*" (Indala Movado), memore al Sankta

Indalecio, antikva episkopo de Almerio dum la 1-a jarcento p.K. Tiel, ili nomis la figuron kiel *Indalon*. La nomo disvastiĝis kaj fine ĝi reprezentis ne nur tiun kulturen movadon, sed ankaŭ la urbon Almerion kaj la tutan provincon.

Nuntempe, Indalo, la antikva pupo de Mojácar, estas la simbolo plej konata de Almerio.



# Vorto-Ludoj



## Krucvorto

	1	2	3	4	5	6	7
A							
B							
C			■				
Ĉ			■			■	
D					■		
E							■
F							


### HORIZONTALE

- A. Ejo, en kiu oni produktas pogrande komercaĵojn.
- B. Aŭtoro de verkoj, ĝenerale nelongaj, ofte asimilita al esploro aŭ monografio.
- C. Subjuncio, enkondukanta kompletigajn propoziciojn. ■ (*Sen la lasta vokalo*) Remaĉanta mamulo kun grandaj kornoj kaj barbo ĉe la mentono.
- Ĉ. Verba finaĵo. ■ Numeralo. ■ En la hispanaj aŭtomobiloj.
- D. (*Inverse kaj sen la lasta vokalo*) Franca urbo. ■ (*Inverse*) Interjekcio esprimanta ekmiron, surprizon antaŭ io bona aŭ malbona.
- E. (*Akuzative*) Tre maldika, longa kaj fleksebla vergo el metalo aŭ alia materialo, ĝenerale rondsekca.
- F. Tenso en kelkaj lingvoj (helena, bulgara k.a.), esprimanta okazintan faktan en difinita momento de pasinteco.

## VERTIKALE

1. Kapabla reprodukti sin.
2. Helpa kunsidanto de juĝisto a ŭde prezidanto.
3. Interjekcio uzata por esprimi konfuzitecon. ■ (*Inverse*) La plej granda televida grupo en Italio kaj la kvina en Eŭropo.
4. Detranĉi kaj amasigi semitajn gramineojn, por la homa aŭ besta nutrado.
5. (*Inverse kaj se la lasta vokalo*) Grupo de arboj kun plume kunmetaj folioj kaj kun flavaj, rozaj aŭ ruĝaj, ĝenerale regulaj floroj unuopaj, kultivataj por ornamo kaj medicino. ■ Verba finaĵo.
6. Kaj ceteraj. ■ Sufikso prezentanta la plenumanton de procezo dum ties plenumiĝo.
7. (*Inverse*) Homo distingiĝinta per eksterordinare grandaj faroj. ■ Vokalo.

## Rebuso



Kiuj estris post la revolucio? \_\_\_\_\_

*Se vi kapablis solvi ĉi tiujn vorto-ludojn, sendu vian solvon al jena ret-adreso:  
cordoba@esperanto.ac*



## SOLVOJ AL LA PASINTAJ KRUCVORTO KAJ REBUSO

	1	2	3	4	5	6	7
A	T	R	A	D	U	K	I
B	O	T	N	A	L	A	G
C	R	■	D	N	■	A	V
Ĉ	E	■	O	K	A	B	A
D	N	O	R	E	■	O	N
E	T	E	A	M	O	■	O
F	A	L	N	O	M	O	J

### REBUSO

En kiu loko situas la soldatoj? *En la dua posteno.*

Sur la bildo aperas la vortoj EL EN EK. En la dua vorto (EN), la litero N (No) situas post la litero E. Do, en la dua post E No.

### HUMURO



# Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

## Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio. Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi

La Asociación Andaluza de Esperanto es la organización que tiene como objetivo difundir la lengua internacional esperanto en Andalucía. Se fundó en el año 1984 gracias a la iniciativa de esperantistas de las provincias de Málaga, Sevilla y Córdoba. Hoy pertenecen y colaboran con AEU esperantistas de toda Andalucía y también de fuera de ella.

### Estraro

Prezidanto / Presidente:  
Vicepresidente / Vicepresidanto:  
Sekretario / Secretario:  
Kasisto / Cajero:  
Voĉdonantoj / Vocales:

### Directiva

Ángel Arquillos López  
Fátima Jiménez García  
José M<sup>a</sup> Rodríguez Hernández  
M<sup>a</sup> Dolores Torres Mateo  
Jordi Lietor López  
Juan García del Río  
Carlos Spinola  
Alejandro Burgos Escalante  
Juan Díaz Casado

Poŝta adreso / Dirección Postal: C/ Ánfora 6 5º D 29013 Málaga (Hispanio)  
TTT-paĝo / Página web: [www.esperanto.ac](http://www.esperanto.ac)  
Tvitero / Twitter: [@AndaluzioEO](https://twitter.com/AndaluzioEO)

[Aliaj adresoj de la E-movado / Otras direcciones del movimiento esperantista:](#)

Federación Española de Esperanto: [www.esperanto.es](http://www.esperanto.es)  
Asociación Universal de Esperanto: [www.uea.org](http://www.uea.org)





**107-a Universala Kongreso de Esperanto**  
**de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto 2022**  
**en MONTREALO (Kanado)**